Jar-raporto de la Usona Ekzamena Servo

De la 28-a de junio, 2006, gxis la 1-a de junio, 2007

Haveblas ekzamenoj je tri niveloj: Komencgrada, Duagrada, kaj Supera. Informojn pri la enhavo de çiu nivelo oni povas ricevi kontrau peto. Çar la instrukcioj por la administranto kaj la ekzamenigxonto estas en la angla lingvo, la ekzamenoj taugas nur por personoj kiuj scipovas la anglan. (La internaciaj ekzamenoj de ILEI-UEA estas tute en Esperanto kaj estas administrataj nur de Esperantistoj kiuj ricevis specialan trejnadon.)

Por ekzamenigxi, necesas nur peti al UES, kaj sendi kotizon ($10) kaj la nomon de fidinda homo (ekzemple instruisto) kiu jam konsentis administri la ekzamenon (necesas nur ke tiu scipovu la anglan).

Çijare 22 homoj ekzamenigxis (lastjare 17). Jen la detaloj:
El la 22 kiuj ekzamenigxis per la Komencgrada Ekzameno, çiuj sukcesis, unu kun distingo (Henry V. Janoski). Çiuj krom li estis klasanoj de Don Houpe çe la "North Carolina School for Science & Mathematics" en Durham, NC.
Neniu ekzamenigxis per la Duagrada Ekzameno çijare (lastjare estis 1).
Neniu ekzamenigxis per la Supera Ekzameno (1 lastjare).

Ekzamenigxo eblos dum la ELNA-kongreso en Tijuana se oni antaue anoncas sin.

Kvankam mi unufoje aperigis en Esperanto USA unu artikolon kiu celis kuragxigi ezamenigxon, evidente tio ne sufiçis motivigi niajn membrojn. Do, eble pli ofta memorigo helpos. Viaj sugestoj estas bonvenaj!

Financa Raporto

Enspezoj:		
Saldo la 12-an de junio, 2006	$314.83	
22 kotizoj po $10 ricevitaj:	$220.00	
Tuta bonhavo:		$534.83
Elspezoj:		
Por kaligrafio: 22 po $5:	$110.00	
Kovertoj	$ 11.09	
Posxto	$ 33.50	
Tutaj elspezoj:		$154.59
Saldo la 1-an de junio, 2007		$380.24

Doroteo Holland, Administranto
5140 San Lorenzo Drive, Santa Barbara CA93111-2521 (805) 967-5241;
<dorothyh@west.net>

Sub la auspicio de la
Esperanto-Ligo por Nord-Ameriko kaj la Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto